



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2014 (200)

29. 1. 2014

## Antaŭparolo de la nova redaktoro

Tomáš Břicháček



Karaj geamikoj,

vi estas legantaj la unuan numeron de la praga Bulteno en la nova jaro 2014, kiu estas ankaŭ la unua preparita de la nova redaktoro. Permesu al mi saluti vin ĉiujn kaj prezenti mian vizion de la estonteco de nia revuo.

Neniu vortoj povas sufiĉi por danki al Jiří Patera, kiu senlace laboris por la Bulteno 35 jarojn. Li lasis malantaŭ si profundan spuron. Mi estas ege honorata, ke li elektis min kiel sian sekvanon. Mi akceptas tiun taskon kun humileco kaj respondeco.

Kiel tutviva konservemulo mi nature ne volas fari iujn dramajn ŝanĝojn. Mi volas konservi la bazan formon kaj naturon de la revuo. Ĝi devas resti informilo de la praga klubo kaj samtempe literatura kaj kultura forumo. Tamen kiel junulo al kutimiĝinta labori kun moderna komputoteĥniko kaj vivanta en juna kolektivo mi povas doni al la revuo novajn impulsojn.

Jen la unua novaĵo: La Bulteno estos eldonata ne nur en presita formo sed ankaŭ elektronike en la interreto sur la paĝo [bulteno.cs-retromusic.net](http://bulteno.cs-retromusic.net) (parto de la portalo CS Retro Music) ... *(legu plu sur la paĝo 2)*

### EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj .....	2
Historio de la Bulteno (J. Patera) .....	8
De kubismo al ekologio (J. Machalický) ...	13
Merkredon mi ŝatas (E. Urbanová) .....	14
Se mi eble ne revenus (J. Karen) .....	15
Kosmaj kantoj post 125 jaroj (Č. Vidman)	18
El la poemoj de Eli Urbanová .....	22
Kuriozaĵoj .....	23

### Klub esperantistů v Praze

Ve Smečkách 24, Praha 1  
schůzky každý čtvrtek 14-16 hod.  
[jiri.patera@atlas.cz](mailto:jiri.patera@atlas.cz)

### Bulteno

[bulteno.cs-retromusic.net](http://bulteno.cs-retromusic.net)  
redaktor: Tomáš Břicháček  
[t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz)

... kaj do estos atingebla en la tuta mondo. Sur la paĝo oni povos ne nur elŝuti la elektronikan formon de la numeroj de la revuo, sed ankaŭ legi aktualaĵon el la vivo de la pragaj esperantistoj, kiuj estos sinsekve aldonataj.

Mi ne volas paroli longe pri mi. Mi estas juristo kaj publicisto, kiu okupiĝas pri la juro de la Eŭropa Unio kaj pri la politikaj problemoj de la eŭropa integrado. Ĉion gravan pri mi vi trovos sur mia persona paĝo <http://www.cs-retromusic.net/brichacek.htm>.

Mi deziras al ĉiuj agrablan legadon kaj ĉefe multe da sano kaj energio en la nova jaro!

## AKTUALAĴOJ

### Eldono de grava traduko el Esperanto

Petr Chrdle



La unua libro de KAVA-PECH eldonota en januaro 2014 estas tre grava el socia vidpunkto, sed ĝi ankaŭ havas intiman rilaton al Esperanto. Temas pri la ĉeĥa eldono de „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ fare de Tivadar Soros, patro de la famkonata usona filantropo kaj hungardevena judo Georgo Soros, verko skribita origine en Esperanto. Ĝia redaktoro, kaj por la Esperanto-eldono, kaj por la angla eldono, estis prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA. Li estas ankaŭ redaktoro de la ĉeĥa eldono, por kiu li iom modifis sian ampleksan klarigan postparolon. La verkon ĉeĥigis el la Esperanto-originalo Jindřiška Drahotová.

Mi konfesas, ke estas malmultaj libroj, kiuj postlasis ĉe mi tiom profundan impreson kaj kiuj pensigis min same kiel ĉi tiu libro. Ĝi estas skribita vive, do mi legis ĝin unuspire, tamen ĝi ankaŭ riĉigis min pri multaj scioj, kiuj restis por mi ĝis tiam nekonataj.

La verko estos eldonita en belaspekta formo kun solida bindado kaj la eldonejo jam ekde nun akceptas antaŭmendojn por ĝi. Unu abonita ekzemplero kostos 200 Kč, se vi deziros ĝin donaci al siaj neesperantaj amikoj, vi povas ricevi 3 ekzemplerojn kontraŭ 500 Kč kaj ĉiun pluan libron kontraŭ 160 Kč. La supozata fina vendoprezo estos inter 350 kaj 400 Kč. La antaŭmendojn kontraŭ la indikitaj prezoj ni akceptas nur ĝis la 10-a de januaro (por ke ĝi povu montri al ni la intereson de la publiko kaj do influi la eldonkvanton de la libro).

La libro (same kiel la ceteraj libroj de la eldonejo KAVA-PECH kaj memeldonitaj libroj de Jindřiška Drahotová) estos trarigardeblaj (kaj aĉeteblaj) ankaŭ enkadre de la evento. Fine de ĝi okazos la aŭtogramiado, kie eblos ekhavi

subskribojn de ambaŭ ĉefaj agantoj (krom la forpasinta aŭtoro), nome de la redaktoro H. Tonkin kaj de la tradukintino J. Drahotová.

Jen fragmento de la antaŭparolo de George Soros:

*Nejsem schopen být k této knize objektivní, protože popisuje období mého života, které mě formovalo, a napsal ji můj otec. Otec byl pro mne v té době nejdůležitější osobou. Kniha popisuje události, které se velice ostře vryly do mé mysli, daleko ostřeji než všechno to, co jsem prožil později.*

*Němci provedli okupaci Maďarska 19. března 1944. Rusové nás osvobodili 12. ledna 1945. Po celých deset měsíců jsme žili ve smrtelném nebezpečí. ...*

*Není to právě vhodné se tak vyjádřit, ale těch deset měsíců bylo vlastně nejšťastnějších v mém životě. Bylo mi čtrnáct. Trvale jsem byl v ohrožení, ale mně se zdálo, že otec má věci pevně v ruce. Uvědomoval jsem si nebezpečí, protože otec se mnou trávil mnoho času a situaci mi objasňoval, ale v hloubi svého srdce jsem nevěřil, že by se mi mohlo něco stát. Pronásledovaly nás síly zla, ale my jsme se nalézali na straně andělů, protože jsme byli stíháni nespravedlivě; kromě toho jsme se snažili zachránit nejen sami sebe, ale také jiné. Okolnosti nám nepřály, ale my jsme se přesto cítili ve výhodě.*

*Co víc si může přát čtrnáctiletý? Svěho otce jsem zbožňoval a obdivoval. On v mládí prožil život plný dobrodružství a my jsme se spolu královsky bavili. Myslím, že určitý stupeň tohoto nadšení vyzařuje i z této knihy, ale můj otec byl příliš skromný na to, aby se chlubil, kolika lidem pomohl.*

*Můj otec byl velmi dobře připraven postavit se německé okupaci, protože něco podobného prožil již dříve. Za 1. světové války uprchl ze zajateckého tábora na Sibiři a zapletl se do Ruské revoluce. Naučil se, jak si počínat v situacích, kdy normální pravidla neplatí. Zkušenosti ho zocelily. ...*

*Tato dobrodružství mého otce změnila. Jeho ctižádost se vytratila. Cítil štěstí jen z faktu, že žije. Jeho ambicí se stalo užívání života. Líbilo se mu dobře žít a jeho cílem nebylo hromadění bohatství. Materiální statky považoval za přítěž, která může člověka potopit nebo dokonce připravit o život. Byl to jediný mně známý člověk, který se systematicky*

*zbavoval svých aktiv ... „Jen ta část kapitálu, která je v mé hlavě, je důvěryhodná,“ říkával žertem. ...*

*Nasával jsem do sebe jeho názory na život. To mi později hodně pomáhalo. Umění přežít jsem se vyučil u skutečného mistra.*

*Povaha mé maminky byla úplně jiná. V knize je to zřejmé. Miloval jsem je oba hluboce. Snažil jsem se následovat vzor svého otce, ale s matkou jsem si byl bližší. Oba se tak stali částí mého já. A protože byli tak rozdílní, po celý život ve mně tyto dvě rozdílné osobnosti bojovaly. Ale to je jiné vyprávění, zde má slovo můj otec.*

## Jubileoj de pragaj geesperantistoj en la jaro 2014

Jiří Patera

**Adolf Bartošík** (1907-05-01 Boršice – 1989-02-03 Praha), honora membro de ĈEA, fama pro siaj priesperantaj grafikaĵoj, ekz. la portreto de L. L. Zamenhof, ofte li ekspoziciis esperantajn filatelaĵojn

**Hynek Karel Bouška** (1884-03-04 Praha – 1962-01-13 Praha), aŭtoro de lernolibroj kaj informlibroj, tradukinto, redaktoro, en la 1920-aj jaroj estis en pragaj ĵurnaloj ĉiutage kelkaj liaj informoj pri Esperanto

**Petr Ginz** (1928-02-01 Praha – 1944 Oświęcim), filo de elstara ĉeĥa esperanta redaktoro kaj tradukisto Ota Ginz, li pereis en gaskamero, konserviĝis liaj taglibroj, artikoloj kaj romano kaj desegnaĵoj

**Stanislava Chrdlová** (1954-10-01 Kyjov – 2000-01-28 Praha), instruistino, instruis ankaŭ en Japanio, kunverkis lernolibron de Esperanto kaj esperantan konversacion kaj kantareton „Kantoj por ĝojo“

**Zdenko Křimský** (1934-05-27 Slovenské Nové Mesto – 1999-07-22 Mělník), sekretario de ĈEA 1973-1985, ĝis 1984 redaktis Starton, en kiun li enkondukis reklamojn, dank' al kio ĈEA estis finance stabila. Li iniciatis raporton „Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto“ (1981, trad. J. Vondroušek)

**Eduard Kühnl** (1884-05-16 Praha – 1966-05-23 New York), unu el la pioniroj de la ĉeĥa Esperanto-movado, aŭtoro de lernolibro kaj vortaro, kuntradukinto de „Sherlock Holmes en servo de la hispana trono“ (František Lelíček ve službách Sherlocka Holmesa, de H. Vavris). Post la unua mondmilito li laboris en ĉeĥoslovakaj ambasadoj en la suda Ameriko kaj nian movadon li ne plu influis. Li mortis en 1966 en Nov-Jorko

**Eva Seemannová** (1920-03-21 Praha – 1999-01-21 Praha), origine esperanta poetino, profesie aktorino, fondis teatran kolektivon de nia klubo en Praha sub la nomo „Verda Ĉaro de Julio Baghy“. Ĝi prezentis vicon da teatraĵoj, ekz. Maryša de fratoj Mrštík, Pigmaliono de G. B. Shaw, Ĉe l' akvo de forgeso de M. Boulton, Nora de H. Ibsen, Legendo pri amo de N. Hikmet, kiu mem ĉeestis la spektaklon. En la UK en Varsovio en 1959 ĝi sukcese prezentis Pigmalionon. E. Seemannová poste prezentis en formo de teatro de unu aktoro multajn verkojn, precipe de Ĉ. Vidman

**Alexander Sommer-Batěk** (1874-06-15 – 1944-04-06), profesoro pri ĥemio en Plzeň, proponis modernan ĉeĥan terminologion por neorganikaj kombinaĵoj, popularscienca verkisto kaj redaktoro, eldonanto de la gazeto Zájmy všelidské (Tuthomaraj interesoj), kiu enhavis esperantlingvajn resumojn de artikoloj, li elpensis internacian pazigrafion „Neoglifoj“

**Jaroslav Sucharda** (1919-08-15 Praha – 1964-08-18 Praha), membro de „Verda Ĉaro de Julio Baghy“, en teatraĵo de A. Seemann „Mi esperas“ li prezentis D-ron L. L. Zamenhof

**Julie Šupichová** (1884-01-27 Studenice – 1970-12-20 Praha), aŭtorino de lernolibroj, legolibroj, frazaroj, korespond-libroj kaj diversaj inform-libroj, aŭtorino de ĉeĥlingva biografio de L. L. Zamenhof en la serio „Kdo je?“ (Kiu estas?)

**Jaroslav Šustr** (1901-12-06 Praha – 1969-09-08 Praha), dum pluraj jaroj ĝenerala sekretario de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovakio, prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha 1932 – 1958

**Štěpán Urban** (1913-10-04 Bořanovice – 1974-05-04 Praha), gitar-virtuozo, muzik-pedagogo, komponisto, astrologo, antroposofo, esperanta poeto kaj verkisto, pri li estis ampleksa artikolo en la antaŭa numero de nia Bulteno

**Alois Václav Zedník** (1894-06-18 Chotutice – 1969-07-24 Praha), tradukis el Esperanto en la ĉeĥan humorajn tekstojn de R. Schwartz kaj de aliaj kaj sukcesis aperigi ilin en la ĉeĥa humura gazeto Dikobraz (Histriko).

---

## Retpaĝaro de E-mental



La klubo E-mental havas novan retpaĝaron: <http://www.e-mental.cz/>

Vi trovos tie informojn pri la kunvenoj kaj aliaj aranĝoj de la klubo kaj multe plu.

---

## El leteroj de niaj legantoj

Dankon por via ĉiam interesa gazeto Bulteno.

Mi tre bedaŭras forpason de s-ino Helena Maudrová, ĉiam helpema, aktiva, ŝi pensis pri ĉiuj.

Volonte mi legis pri s-ano Jaroslav Mařík.

Ili ripozu en paco.

Jitka Skalická, Romo



# Venontaj aranĝoj

## Bapto de la libro **Maskerado ĉirkaŭ la morto**

**La 10-an de februaro 2014** ekde la 16-a horo en la sidejo de JTP (Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj, Jednota tlumočníků a překladatelů), Senovážné náměstí 23, Praha 1 okazos bapto de la ĉeĥa versio de **Maskerado ĉirkaŭ la morto**. Ĝin ĉeestos krom la tradukintino J. Drahotová ankaŭ la redaktoro de la verko H. Tonkin, profesoro kaj eksa prezidanto de la Hartford-Universitato en Usono. Jam antaŭ la evento, ekde la 14:30, prelegos H. Tonkin en la angla (sen traduko) por la ĉeĥaj anglaj tradukistoj kaj lingvistoj pri la problemoj de tradukoj de memoraĵoj, kion li demonstros sur la ekzemploj de sia traduko de la verko de Soros el Esperanto anglan. Do, kiu komprenas la anglan, estas invitata ankaŭ al la unua tiutaga evento.

---

## Bestĝardeno 2014

**La 1-an de marto 2014** ekde la 11-a horo okazos la tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno kun festo de "adoptotago" kaj granda konkursa pikniko.

### La programo:

- 11. 00 – KUNVENO ANTAŬ PRAGA BESTĜARDENO
- 11. 10 – LOTUMADO DE LIBERAJ BILETOJ
- 11. 20 – ENIRO EN BESTĜARDENON
- 11. 30 – KOMUNA FOTADO MALANTAŬ LA ENIREJO
- 12. 30 – KUNVENO SUR “PIKNIKA LOKO”
- 12. 30 – KONKURSO PRI LA PLEJ BONA UNUBUŜAĴO
- LIBERA TRARIGARDO DE LA BESTĜARDENO
- 17. 00 KUNVENO EN RESTORACIO

## 39-a Lingva Seminario en Skokovy

**Ekde la 12-a ĝis la 18-a de majo** okazos la tradicia semajna seminario en familieca pensiono ESPERO, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta parto de sabloŝtona Bohemia Paradizo, plena de divesspecaj turismaj allogaĵoj (kulturaj kaj naturaj).

Senbara medio, 2–5 litaj ĉambroj, prezo proksimume 420 CZK/tago por kompleta servo je unu tago (tranokto + 3 manĝoj). Kontribuo por organizaj kaj programaj elspezoj (minim. 100–200,– CZK – laŭ longeco de la restado). Oni pagas surloke. Eblas ev. veni ankaŭ por malpli da tagoj!

Programo: Lingvoinstruado kaj lingvopraktikado diversgrada, ekskursoj, promenoj, rilakso, manlaboraj atelieroj, vespera amuziĝo, kantado, filmprojekciado ktp.

Aliĝiloj kaj informoj: Jindřiška Drahotová, [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz), tel. 720 652 320

# Pasintaj aranĝoj

## Junulara antaŭkristnaska renkontiĝo

Jan Šebetovský



Dum JARo (Junulara antaŭkristnaska renkontiĝo) ni festis 30-jariĝon de la junularo, Zamenhofan tagon kaj eĉ ni sukcese organizis ĝeneralan asembleon. Vendrede ni vizitis kafejon Světnička, kie ni krom longe konataj vizaĝoj vidis ankaŭ Ondřejon, kiu post dumonata studado de Esperanto vizitis unuan Esperantan renkontiĝon. Mi devas diri, ke li kapablis bone paroli. Nian babiladon ne povis ne aŭdi kelnerino,

kiu tuj interesiĝis pri tiu stranga lingvo, kiun ni parte uzis, kaj poste ŝi ankaŭ adiaŭis kun ni en Esperanto.

Sabaton ni dediĉis al festado de la 30-a jubileo de fondo de junulara grupo. Antaŭtagmeze ni trairis Pragon kaj ekkonis gravajn lokojn de historio de la Esperanta junularo. Tiel ni eksciis, kie iam estis junulara klubejo kaj kien ili iradis refreŝiĝi (kaj ankaŭ kien ili ne plu povis iradi). Posttagmeze ni tostis kaj gustumis torton, pro kiu ni ege dankas al Vlasta. Poste ni trarigardis valorajn memorlibrojn, kiuj krom mesaĝoj de vizitintoj enhavas ankaŭ interesan leteron, kiu priskribis okazaĵojn dum renkontiĝo, dum kiu oni mobilizigis homojn antaŭ la dua mondmilito. Vespero finiĝis en gastejo, kie ni ludis amuzan vortan ludon. Danke al ludado en Esperanto ĝi estis eĉ pli amuza.

Dum dimanĉa antaŭtagmezo okazis ĝenerala asembleo. Kvankam ni planis tosti kun italaj esperantistoj je la Zamenhofa tago, pro malbona konekto ni povis nur saluti ilin kaj ni devis fortrinki preparitan botelon sole. Poste ni jam rapidis al la memorŝtono ĉe Vyšehrad, kie ni renkontis aliajn amikojn, por ke ni komune kantu himnon kaj preparolu novaĵojn. Dum la babilado ni kompreneble malsatiĝis, do ni iris akiri fortojn en gastejon, por ke ni povu fini interrompitan asembleon.

Festado bonis. Mi nur bedaŭras, ke ĉi-jare ne ĉeestis neĝo. Espereble ĝi venontfoje partoprenos ankaŭ.

Pli da fotoj vi povas rigardi ĉe [http://dyktatorka.rajce.idnes.cz/JARo\\_2013](http://dyktatorka.rajce.idnes.cz/JARo_2013).

(el la paĝaro <http://mladez.esperanto.cz>)

## Historio de la Bulteno

Jiří Patera

Nia Bulteno komencis aperi en la jaro 1953. Pli frue informoj pri la klubo aperadis en la presita revuo *Esperantista*, organo de la tiam tutŝtata organizaĵo de ĉeĥaj esperantistoj. Sed en la jaro 1950 ĉiuj tiamaj E-gazetoj estis malpermesitaj kaj la kluba komitato povis kontakti siajn membrojn nur perpoŝte. La klubo tiam havis kelkcent membrojn, eble 200 – 300, sed la kunvenojn partoprenis nur 40 – 50 membroj. Estis do necese la ceterajn membrojn informi pri diversaj aktivecoj de la klubo, pri programo de kunvenoj, pri kotizoj ktp., kaj tion oni faris per leteretoj, flugfolioj, informiloj, ĝis fine aperis la ideo eldonadi Bultenon kun ĉiuj necesaj informoj kaj eĉ kun literaturaj tekstoj. Tiu Bulteno estis stencilita, du- aŭ kvar-paĝa, signita kiel *Presaĵo* kaj por tio sufiĉis 50-helera poŝtmarko. La bultenon redaktis fama esperantisto Josef Vitek kaj ĝi havis baldaŭ abonantojn en la tuta lando, sekve ĝi estis ne nur praga informilo, sed tutlanda. Ĝi aperadis eĉ en eldonkvanto de 800 ekzempleroj kaj kontribuis al ĝi la pragaj geesperantistoj, kiel S. Kamaryt, Eli Urbanová, T. Pumpr, J. Mařík kaj aliaj.

La bulteno aperis neregule ĉiumonate, sed iam pli ofte, iam kun pli longaj paŭzoj. Okazis, ke ĝi ne aperis eĉ dum du-tri jaroj. Tion ĉi mi aŭdis pli poste, ĉar mi origine ne estis pragano. Mi loĝis en nordbohemia urbo Most kaj en Pragon mi transloĝiĝis fine de la jaro 1977. Mi ricevis postenon en ministerio de financoj kaj mia edzino en la ĉefa kont-oficejo de ŝparbanko. Kaj mi tuj fariĝis membro de la praga klubo kaj eĉ ricevis funkcion en la kluba komitato kiel kultur-referento. Mia tasko estis prepari programojn de kunvenoj kaj ankaŭ iom kontribui al la bulteno. La bulteno tiam ne havis redaktoron, ĝi estis simple *eldonata de la klubo*. Kaj bonŝance estis tiam bonaj kontribuantoj, ekz. la kluba prezidantino H. Štruncová, J. Mařík, L. Kynčl, A. Slanina, E. Urbanová, J. Ondráček, E. Seemannová, R. Horský, J. Vích, J. Cíhová, Z. Khail kaj multaj aliaj.

Mia unua ĉefartikolo en la bulteno aperis sur la unua paĝo de la novembra numero 1978 kaj havis titolon „Sesdek jaroj de Ĉeĥoslovakio“. Poste mi jam skribis regule artikolojn ŝajne politikajn, sed fakte „pacmovadajn“, ĉar tio estis por Esperanto tre grava en la tiam politika situacio. Tre sukcesa estis ekzemple la artikolo el novembro 1984 „Novembro – monato de Esperantaj amaskomunikiloj“, ĉar ĝi estis komplete elsendita en la E-programo de Radio Polonia la 27-an de novembro kaj ripete la 28-an de novembro 1984. Oficiala redaktoro de la bulteno mi fariĝis nur en la j. 1989, kiam por tiu funkcio min nomumis la kluba jarkunveno en aprilo 1989.

En tiu jaro okazis grandaj politikaj ŝanĝoj en nia lando kaj en la tuta Eŭropo, la komunismo bankrotis kaj la renovigita demokration post la komenca entuziasmo ekis influi negativajoj de kapitalismo. En la tiamaj numeroj de la



bulteno la nova demokratio neniel manifestiĝis kaj eĉ okazis, ke la bulteno en la jaro 1994 ĉesis tute aperi. Dum la komunismo la kontaktoj kun *la Okcidento* estis malfacilaj, oni ne povis vojaĝi tien, nek aboni kaj aĉeti libere gazetojn kaj librojn, tiam Esperanto funkciis kiel iaspeca anstataŭanto, ĉar pere de ĝi oni povis almenaŭ korespondi kaj partopreni esperantajn aranĝojn en *la Oriento*. Sed post la politikaj ŝanĝoj, kiujn iuj nomas „revolucio“, okazis ŝanĝoj ankaŭ en nia Esperantujo: oni povis libere vojaĝi, aboni kaj aĉeti kion ajn, tiam oni prefere komunikis per la angla, germana kaj aliaj lingvoj, kaj Esperanton oni subite ne bezonis. Tio respeguliĝis ankaŭ en la praga klubo: la nombro de partoprenantoj de kunvenoj sufiĉe falis, falis entute la nombro de klubanoj kaj malaperis ankaŭ la bulteno.

Kiam mi partoprenis konferencojn kaj kongresojn de ĈEA, ĉiam mi aŭdis, ke la praga klubo stagnas, kvankam stagnis la E-kluboj ankaŭ en aliaj urboj. Do, kion fari? Plifortigi la klubon, fari kursojn kaj tiel pligrandigi la klubon montriĝis neebbla, ĉar nur malmultaj aliĝis al kursoj kaj baldaŭ forfalas, dum la nombro de klubanoj plu malkreskis. Bonan efikon havis la Universala Kongreso en 1996, ĉar ĝi vekis kaj laborigis kelkajn dormantojn, sed poste la malbona stato daŭris plu. Estis klare, ke necesas fari ion videblan, ekzemple renovigi la bultenon. Tio okazis nur en la jaro 2000, post kelkaj provoj en 1998 kaj 1999. Do en la jaro 2000 komencis denove aperi nia Bulteno post kelkjara paŭzo, kvar numeroj jare. Kaj en la konferencoj kaj kongresoj de ĈEA estis klare videbla la nova stato de la klubo: ho, la Praga klubo reviviĝis, ĝi eĉ eldonas Bultenon, kia progreso!

Ĉar la esperantaj gazetoj estas kutime tre seriozaj, tro gravmienaj, mi volis, ke nia Bulteno estu male amuza gazeto, kun amuzaj rakontoj, gajaj poemetoj kaj kantetoj, kun multaj anekdotoj por ke la legantoj ĝoje atendu ĉiun novan numeron. Tiam mi komencis aperi miajn tradukojn de amuzaj rakontoj de Jaroslav Hašek, la aŭtoro de brava soldato Ŝvejk. Sed iuj maljunaj klubanoj ne ŝatis la rakontojn de Hašek kaj mi devis cedi tiurilate. Kaj aperis alia afero. Venis simpatia virino, montriĝis, ke ŝi estas poetino Věra Ludíková; ŝia poemaro *Uslyšet duši* (Ekaŭdi la animon) ĵus aperis dulingve esperante-ĉeĥe en traduko de Jaroslav Mráz kaj Miroslav Malovec. Kaj ŝi esprimis la deziron, ke ŝiaj pluaj poemoj kaj tekstoj aperu en Esperanto. Tiel ŝiaj verkoj komencis aperadi en la bulteno. Kaj tuj sekvis ŝin alia ĉeĥa poetino Zdenka Bergrová, kies verkoj ankaŭ plenigis paĝojn de Bulteno. Mi ne kapablas traduki poemojn, mi do tradukadis prozajn tekstojn, kaj poemojn esperantigadis Jaroslav Mráz kaj post lia frua morto Jaroslav Krolupper, kiu subite aperis kiel kompetenta poemverkanto kaj tradukanto. Kaj estis postuloj aperi en Bulteno la verkojn de Čestmír Vidman, leterojn de Jiří Karen, rakontojn de Kamila Bártlová, tekstojn de nia klubano Jindřich Ondráček k. a. Krome pro financaj kialoj la kluba komitato decidis eldonadi ĉiujare nur tri numerojn de la bulteno, tiam miaj redaktoraĵoj eblecoj estis tre limigitaj kaj mia ideo pri amuza gazeto forvaporigis. Ĉar la oficiala organo de ĈEA *Starto* fariĝis nura movada informilo sen iaj ajn literaturaĵoj, tian literaturan rolon komencis parte transpreni nia bulteno. La bulteno estis origine nura kluba informilo. Ĉar la klubaj aktivecoj estas tre

malmultaj kaj malgrandaj, estas necese la bultenon plenigi per literaturaĵoj. Tamen la bulteno ĉiam restas kluba informilo, malgrandformata kaj amatora, eldonata en la nombro de 120 ekzempleroj, do tute neniu tutlanda literatura gazeto.

Lastatempe forpasis iuj gravaj klubanoj, kiel Eli Urbanová kaj Jindřich Ondráček, antaŭ nelonge ankaŭ Ĉestmír Vidman, kaj tiam aperis neceso ĝustatempe trovi ankaŭ novan kaj ĉefe junan redaktoron de la bulteno. Post mia 35-jara laboro por la bulteno estis jam urĝa tempo havi junan kaj kleran redaktoron kun novaj ideoj kaj kapabloj. Kaj tia persono en Prago bonŝance ekzistas.

Li estas iama estro de la praga E-junularo, do kapabla kaj sperta esperantisto, finstudinto de du fakultatoj de Karola universitato en Prago kaj sekve duobla doktoro (JUDr. + PhDr.), studinto en la universitato en Parizo, instruanto en la Tuteŭropa altlernejo en Prago, redakciano de gazeto *Revuo Politiko*, kiam restas al li tempo, do ankaŭ oficisto en ministerio de justeco. Li do estas oficiale juristo kaj publicisto, li estas fakulo pri la ĉeĥa dancmuziko de duono de la 20-a jc., li prizorgas kelkajn ret-paĝojn kaj publikigas tie (ĉeĥlingve) siajn blogojn. Sed li havas ankaŭ familiajn devojn, ĉar antaŭ nelonge naskiĝis lia dua filo, sekve redakti la bultenon estos por li plua tempbezona laboro. Lia nomo estas Tomáš Břicháček kaj ankaŭ mi estas preta ankoraŭ iom helpi al li kaj precipe daŭrigi la esperantigon de leteroj el la milita tempo de Jiří Karen kaj ankaŭ la artikolojn de la verkistino V. Ludíková. Kaj Tomáš certe trovos kunlaborantojn inter junaj pragaj geesperantistoj, kiel ekz. Daniel Mrázek, kiu en *Literatura Foiro* aperigis jam kelkajn recenzojn pri moderna Esperanta muziko.

Mi estas konvinkita, ke la Bulteno de Esperantista klubo en Prago havas antaŭ si bonan estontecon kaj ĝi apartenos ne nur al bonaj kaj kvalitaj klubaj eldonaĵoj, sed estos laborejo kaj lernejo por pluaj novaj Esperanto publicistoj, verkistoj kaj tradukistoj.

---

## **Letero al la konferenco de ĈEA en Kutná Hora**

Věra Ludíková

Kutná Hora la 17-an de novembro 2013

Estimataj partoprenantoj de la aŭtuna Ĉeĥa Konferenco, karaj amikoj, permesu al mi, ke mi ĉi-foje salutu vin nur distance, ke mi imagu vin en salonego plena de lumo, en spaco plenigita de krea spirito, kvazaŭ ĝuste ĉi tie koncentriĝus ideoj de altvaloraj homoj, kiuj pensas pri la vivo, pri ĝia valorigo kaj konservo sur la Tero, eĉ en la tuta Universo, kaj do en kompleto, kio nin ŝovas pluen kaj alten, al tio ĉio, kio la homon superas...

La nunjara malfrua somero kaj belega aŭtuno estas por mi koncentritaj en la arboplena montokresto de arbaro de Krč kun mateniĝoj kaj vesperiĝoj super ĝi, kiujn mi povis sekvi el la praga hospitalo post peza operacio de la koro, kiu donis al mi novan ŝancon reveni en la vivon, ĝi donis al mi la ŝancon de

renaskiĝo. La animo estas limigita nek per tempo, nek per spaco, ĝi eĉ forigas la diferencon inter la vivo kaj la morto en nefiniĝanta daŭreco. Ĝi taksas, resumas, rekolektas la fortojn, rifuzas kliniĝi antaŭ senespero, malaprobas malvenkon kaj estas dankema, grandioze dankema al la mirindaj kuracistoj, estas dankema al gardanĝeloj, estas senfine dankema al Dio mem. Sed mi devus la gracon redoni en tia formo, en kia ĝi estas kapabla la bonon redoni...

Unu tristan datrevenon, la 8-an de novembro 1620, ni prefere ne rememorigas, ĉar por ni ĝi fariĝis sinonimo de nacia plago, ĝi nome estis la malvenko de la ĉeĥa nobelara soldataro sur Blanka monteto. La tiama konkreta preteksto aspektas bagatela: la motivo estis la indigno de evangelianoj, ke la spirita estraro en la ĉefepiskopa urbeto Hroby ĉe la saksa limo kaj en la klostra benediktana urbo Broumov la novkonstruitajn preĝejojn de siaj luteranaj subuloj aŭ igis detruji, aŭ fermi kaj la ribelantajn urbanojn ĝi enprizonigis. La evangeli-anoj en tio vidis rompon de Majesto, ĉar la registaro malpermesis ion, kio per la leĝo el la jaro 1609 estis permesita. La evangeliaj nobeloj kredis tion, ke ili obeas la leĝon kaj estis decidiĝintaj ne obei la reĝan malpermeson kunvenigi la deputitaron. En tiu ĉi konflikto reale temis pri sensignifa parto de la bohemia grundo, pro kiu la grandega plimulto de la lando kuraĝis batali, kio prezentis grandan riskon, eĉ tute ĉion, kio montras, kiel grandvalora por ĉeĥoj estis la rajto.

La konsekvencoj de Blanka monteto estis katastrofaj. La ekzekutoj la 21-an de junio 1621 sur la Malnovurba placo, la konfiskoj, kiuj estis ĝuste tiom terura puno – kio devis esti puno, ofte fariĝis rabado kaj trompado; la lando ruinigita de tridekjara milito, forbruligitaj vilaĝoj, forbruligitaj kaj prirabitaj urboj, ruinigitaj aŭ prirabitaj staloj, kaj tute sendiference ĉu temis pri armeo de amiko aŭ malamiko, triono de kampoj nekulturataj... Malaperis la tuta duono de loĝantaro, sed estiĝis nova tavolo de riĉiĝintoj. En la tempo, kiam la katastraj registroj estas plenaj de atestoj pri senmezura mizero de simpla homo, kreskas en Prago (kaj ankaŭ en kamparo) sublimaj nobelaj palacoj, preĝejoj, klostroj kaj Prago levas al ĉielo siajn monumentajn kupolojn de nova Ĉeĥio, Ĉeĥio de kelkaj miloj, aŭ pli vere de kelkaj centoj da personoj, kies potenco kaj lukso elkreskas el ruinoj de centmiloj!

Sed la kontraŭreformacia tempo ne estis totala obskuro. Baroko portis kun si fortan kultur-elementon, ĝi priregis la arĥitekturon, pentroarton, muzikon kaj popolan arton, ĝi havis kapablon de mistikaj ekzalto kaj ardiĝo, simile kiel en la komenco de husismo. Baroko donis karakteron al la ĉeĥa lando, ĝi premsignis sin en homajn loĝejojn kaj kostumojn, en kantojn kaj kreis la karakterizan mondon de kamparo, ion specife ĉeĥan. En tiu ĉi tempo ni povas trovi atestojn de morala klopodo, spurojn de spirita ribelo, kiu situas des pli alte, ju pli sen-skrupula estis la subpremo. La avangardaj spiritoj de tiu tempo koncentris la moralan forton al savo kaj renovigo de nacia konscio, por ke la ĉeĥa nomo mem ne estu ĉe ĉeĥoj profanita. Grandajn meritojn pri la konstruo de nova nacia socio havis la pastra katolika inteligentularo, per kio estis mildigitaj la religiaj malpacoj de pasinteco. Per Balbín kaj pluaj komenciĝas la preskaŭ tricentjara ĉeĥa batalo kontraŭblankmonteta, en iliaj manoj transformiĝas scienca laboro en

instrumenton de nacioreviviganta agitado, kia estis la eldono de Defendo de la ĉeĥa lingvo de Balbín. La naskiĝo de naciismo, kiel Balbín (kaj ankaŭ Komenio) malkaŝis, ne estis nur rezulto de germanigo, sed antaŭ ĉio la frukto de la subpremo postblankmonteta. Blanka monteto vekis kaj kultivis en la humiligita nacio forton, kiu estis fariĝonta stimulo de nova vivo kaj promeso de nova espero. La historiisto Josef Pekař konjektas, ke pli aŭ malpli frue la ĉeĥa socio estus trovinta la vojon el danĝero, la vojon al rebonigo.

La tragediaj eventoj de Blanka monteto montras al ni, ke eĉ el malespera cirkonstanco ekzistas vojo, kiu elkondukas la serĉantojn el sub la superregado de perforta silentigado kaj povas evolui eĉ neatendite bone, kiel okazis per la proklamo de la memstara Ĉeĥoslovakio kaj per disfalo de Aŭstrio-Hungario, kompreneble sub la kondiĉo, ke oni nur senfare ne rigardas kaj en la ĝusta momento sur scenejo aperas tiaj personuloj, kia estis ekzemple T. G. Masaryk. Se ni retrorigardas la ĉenojn de eventoj, akompanantaj nian historion, ni povas nur miri kaj senfine miregi pri tio, kio ĉio formis nian nacian karakteron, nian nacion.

La homo delonge sopiras pri tio, kio lin plenigas, li sopiras pri io pli alta, kio lin superas. Daŭre estas por ni granda devoligo daŭrigi la verkon de niaj antaŭuloj, respekti iliajn senmezurajn ofertojn, sen kiuj la ĉeĥa nacio apenaŭ venke defendus sian rajton pri la ekzistado mem. Ni estu ekzemplo por ceteraj, ni estu ekzemplo de nacieca toleremo, ni esploru nian pasintecon, la veran ĉeĥan historion, senigitan de duonveroj, ĉar koni nian historion ebligas pli bone kompreni la hodiaŭon. Ni havas al niaj antaŭuloj, al niaj grandeguloj grandan devontiĝon, sed ankoraŭ pli grandan devontiĝon ni havas al niaj posteuloj kaj al nia belega lando. Ilia postlasaĵo devoligas nin leviĝi el etanimeco, el kverelemo kaj el ĉio, per kio estas la homoj nuntempe tedigitaj. Ni kredu al ni, ke tiujn ĉi testamentojn ni kapablos plenumi!

(Tradukis Jiří Patera)

***Bonvolu viziti niajn interretajn paĝojn***



**Bulteno**  
de Esperantista Klubo en Praha

***bulteno.cs-retromusic.net***

## De kubismo al ekologio

Jiří Machalický

(El la revuo „Medicino & Arto“ pri ekspozicio en Domo de Gustav Mahler)

La pentristo, skulptisto kaj grafikisto Věroslav Bergr certe ne apartenas al la plej konataj artistoj de sia generacio, sed lia verkaro trapasis interesan evoluon, tre proksiman al ceteraj progresemaĵoj artistoj eklaboritaj komence de mil-naŭcent-kvindekaj jaroj. Ĉe la plej fruaj kreaĵoj estas videble, ke Bergr ligis kontaktojn, samkiel vico de aliaj, al la kubismo, kiu ĉe ni estis tre forta. En mutaj naturoj kaj ankaŭ pejzaĝoj manifestiĝis lia sento por lapidara dispartigo de areo kaj spaco, por precize egaligita strukturo. Baldaŭ en lia pentrado manifestiĝis sentemo por esprimo de kolorrilatoj kaj lumtransformoj. Sed poste li baldaŭ alvenis al laŭstruktura esprimo, kaj tiel li enviciĝis en la aktualan fluon de informelo. Komence estis ankoraŭ videbla la influo de la kubisma morfologio, sed en la strukturaj bildoj de la mahlera temo jam plene montriĝis la libere disfluanta energio, kiu en la bildoj efikis simile kiel en la naturo. La komponaĵo estiĝis per interpenetro de fortilinoj, per aligrupigo de materioj kaj per premsignado de certaj elementoj kaj materialoj. Ĝi estis naskiĝanta el hazardo kaj ĥaoso, rememoriganta kreiĝon de kosmaj korpoj, procezojn okazantajn en la naturo. La bildoj ankaŭ rememorigas la forton de muzik-vizioj, kiujn la temoj difuzas, trapenetas, simpligas kaj denove komplikas. Pli poste per limigo de realeco li venis ĝis la kulturitaj abstraktaj komponaĵoj, en kiuj li atingis freŝan kolorecon kaj asonancon de formoj. Samkiel en pentroarto ankaŭ en skulptado li komence inspiroĝis per la kubismo, sed poste li transiris al solide starigitaj simpligitaj figuroj. Sinsekve li komencis formi ekologiajn statuojn, per kiuj li protestas kontraŭ la misuzado kaj neniigado de la naturo, kiun povas la negativaj influoj de nia civilizo detrui. Iuj el la objektoj rememorigas ian malignan proliferadon. Ĉe dislimo inter la plastiko kaj pentroarto estis efikaj fruaj asamblaĵoj. Gravaj partoj de la verko de la artisto fariĝis ankaŭ la grafikaj cikloj, kiujn li kreas ekde la dua duono de la sesdekaj jaroj. Aperas en ili aludoj pri la minaco de militkonfliktoj, estas por ili karakteriza la simbola maniero de esprimado, la meditado pri la senfineco de la universo kaj pri la tempopaso. Věroslav Bergr apartenas al artistoj, kies kreaĵo havas naturan evoluon kaj kies verkaro ankaŭ enviciĝis en aktualajn fluojn de la sesdekaj jaroj. Pri lia kreado okupiĝas kelkaj teoriuloj, kiuj ĝin envicigis en la menciitajn interrilatojn.

(Esperantigis J. Patera)



# LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

## Merkredon mi ŝatas<sup>1</sup> (el la libro *Hetajro dancas*)

Eli Urbanová

Vi demandas, kiel mi ĝojas je dimanĉo? Propre ne tro. Se Ŝtefo almenaŭ ne tiom fumus! Kun kiel alia emo mi laboras, kiam li iam en la salono komponas! Mi miksas farunrostaĵon kaj aŭskultas, kiel li kreas. Kaj mi deziras, ke li sukcesu kaj ke tiu lia rara elano al li eltenu...

Je merkredo mi ĝojas nepre pli. Tiun tagon ni iradas en la klubon. La strato Smečky estas tuj ĉe la Venceslaa Placo. Ĉu vi vidas la larĝajn lumigitajn fenestrojn? Ĝuste tie ĝi troviĝas. Jen la Mekko de la pragaj esperantistoj. Sed ankaŭ de la aliurbaj kaj de tiuj, kiuj alvojaĝis en nian metropolon de ekstere, el la Oriento, el la Okcidento, el la kotraŭa rando de la mondo. Ne unufoje kunvenas ĉi tie eĉ kelkaj naciecoj kaj vi vane divenas, kiu estas kiu, ĉar ĉiuj parolas la saman lingvon.

Ĉe la pordo kiel kutime atendas amike ridetanta Lorenc kaj donas al ni la plumon kaj ni eternigas nin en la prezenc-liston. Mi penas subskribi min legeble, sed Ŝtefo, tiu skizas Ur kaj poste nur tielan linion kaj sur ĝia fino n. Tute interesus min la opinio de grafologo. Lorenc estas kun lia parafo kontenta. Kaj li embuskas la pluan predon. Kiam mi konscias, ke simile li zorgis jam en la kafejo Louvre kaj ke li hodiaŭ postaradas en Prago 4! Por ke vi komprenu, la klubo eble dudekfoje ŝanĝis sian sidejon – ĉio estas pli grava ol Esperanto, bedaŭrinde... Sed kien ĝi moviĝas, tien iras ankaŭ Lorenc...

La subtila sinjorino estas Anjo Bárochová, kasistino de la klubo. Ŝi senĉese kalkulas kaj ion aranĝas, nenio estas pena por ŝi. Anjo, mi petas... Anjo, estu tiel bona... Anjo, kion ni faros kun tiuj bulgaroj, ili nepre ne havas kie tranokti... Anjo loĝas en la centro. Ĉion ŝi lasas, kaptas Esperantan flageton kaj rapidas al la stacidomo. La gastojn ŝi lokas en le ĉambron kaj ŝi mem kaŭriĝas en sia miniatura kuirejo sur la benko. Ankaŭ Anjo vivas nur por Esperanto. Vivis...

Sed jam ekrimarkis nin Ŝustr, la prezidanto de la klubo. La longulo. Li klinas sin al ni desur sia alto. – Bonvenon, sinjoro profesoro... Sur mian manon li ekpremis laŭdevan kison. Ŝustr estas atentema al ĉiu. Ne ekzistas tiu, kiun li preterrigardus kaj neglektus. Vi diros – li estas komercisto, li havas tion ensange. Sed ĉe Ŝustr tio ne estas nura rutino. Lia rilato al la homoj estas vera. Kaj la homoj kredas al li. La pragan klubon li gvidos 28 jarojn. Li plenumas kompreneble ankaŭ aliajn funkciojn. Unu tre pretendan: Li estas ĉefa delegito de la Universala Esperanto-Asocio. La korespondaĵojn oni al Ŝustr liveras en poŝtakoĵ. Preskaŭ sep kilogramojn pezas leterojn, kiuj amasiĝas sur lia skribotablo kaj kiujn necesas respondi. Ne, mi ne intencas ĉi tie paroli pri liaj modele plenumataj taskoj. Pri la ordenoj, kiujn oni al li donis pro liaj eksterordinaraj meritoj. Mi volas mencii sole pri tio, ke li konstruis la

---

<sup>1</sup> La aŭtorino parolas pri la praga Esperanta klubo en la komenco de la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento.

Esperantan bibliotekojn ka ke li trifoje savis ĝian sorton. La unuan fojon dum la germana okupacio, la duan fojon, kiam la klubo perdis la ejon kaj trian fojon en la jaro 1952 post la dumtempa likvido de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Imagu, ke vi devus hejme deponi du milojn da libroj. Ne ĝis morgaŭ, sed por nedefinite. Verŝajne vi ne estus tro entuziasmaj. Ŝustr ne hezitis kaj konservis ilian en sia loĝejo. Kaj kiel pasis la tempo, li aldonis al ili ankoraŭ tri milojn da volumoj, kromalie el Ĉinio, Vietnamio, Laoso kaj Japanio. Hodiaŭ estas “la biblioteko de Jaroslav Ŝustr” la plej valora posedaĵo del la Praga Esperanta Klubo kaj viciĝas al la plej grandaj de tiu speco en la mondo.

Plia signifa personeco, kiun ni ekkonas senpere kaj de proksime, estas Mařík. Jen intelektulo sena de ĉiuj pasioj. Eĉ post pli ol kvardek jaroj mi vidas lin ĉi tiel. Kvankam ni du jam longe alparolas nin pernome, la vi-dirado daŭras. Eble ĝi estas defenda remparo. Mi ne scias. Mi scias nur, ke mi povas al li kiam ajn turniĝi kaj ke lia informo estos preciza kaj elĉerpa. Li havas nome respektindajn sciojn. Sed ankaŭ riĉenhavan arkivon, en kiun sufiĉas enpalpi. Pri Mařík mi ne timas. Nomoj de la korifeoj ne enfalos. Ankaŭ pro tio mi lin estimas, ke li kapablis korekri sian opinion pri Rumler. Pri ties progresivaj tendencoj. Kvankam li ne konsentas kun ĉio komplete. Sed mi ree antaŭkuras. Do nun min imponas, ke li estas la unua profesia radioparolisto de la Esperanta elsendado en la mondo. Tial li parolas tiel flue, tiel memkomprene, sen ia ajn tremo, tial li prononcas tiel perfekte, ke oni aŭdas ĉiun unuopan sonon...

Mekredon mi ŝatas. Multe pli ol dimanĉon. Mekrede ni iradas en la Esperantan klubon.

---

## **Se mi eble ne revenus...** (Korespondaĵoj el Germanio el la milita tempo)

Jiří Karen

14 tagoj, kiuj skuis mian mondon  
(*skizoj el libertempo – daŭrigo*)

Kaj dume estas ĉi tie ŝpinata la idilio de mia futura vivo, mi komencas, ja singardeme, sed tamen nur serioze, debatojn kun la paroĥestro. Li ja estas vivsperta viro, ne estas eble, ke li ne komprenu la modernan tempon. Temas pri la estonteco de la eklezio post la milito. Pri ĉio oni devas pensi jam nun, havi klaran komprenon pri tio, kion fari kaj kiel, kaj ne lasi sin surprizi de cirkonstancoj.

- Klarigu al mi, sinjoro paroĥestro – mi lanĉas eksperimentan demandon – kiel eblas, ke estis dek du apostoloj kaj el ili ankoraŭ unu perfidulo, kaj la kristanismo disvastiĝis tra la tuta mondo. Nuntempe estas en la mondo centmiloj da pastroj, kaj la kredo malprosperas. Se tio tiel daŭros plu, la eklezio kaj religio situos sur la periferio de homa intereso. La plimulto da homoj vivas sen ili jam nun, kiel do en la estonteco? Nuntempe vizitas preĝejon la junularo, ĝi devas, la maljunaj instruas ĝin pri tio, sed kio poste, kiam mortos la maljunaj homoj? Tio estas la unua problemo. Disde la eklezio videble forkliniĝas ankaŭ la inteligentularo, la kredantoj estas pli malpli kaj ĉefe la homoj vilaĝaj, simplaj. Kaj la

homoj urbaj, tiuj komprenas la religion tute formale. Unufoje jare en la preĝejon kaj por konfesi kaj tio estas ĉio. Ĉu eblas esti indiferenta en tiaj cirkonstancoj? La paroĥestro gratas sin malantaŭ la orelo. Li pripensas. Jes, estas necese tion koncedi. Sed pri tio ĉio kulpas la nuna tempo.

- Kiel mi tion komprenu, kio estas la nuna tempo?

- Nu, la homoj, homoj kulpas pri tio. Ili faras la nunan tempon. Kia tempo, tiaj homoj, kiaj homoj, tia tempo.

- Kio estas homoj, ĉu la homaro? Vorto. Homoj, homaro, tio estas vi. Mi, li, ili, ni. La homoj en tiu ĉi urbeto, la homoj el tiu ĉi vilaĝo. Obligu nian vilaĝon kaj niajn urbojn per milionoj da vilaĝoj kaj urboj, kaj vi havas la homaron. Kiam kulpas la homaro, homoj, tempo, propre kulpas neniu. Sed mi opinias, ke estas kulpaj mi, vi, ili, konkretaj homoj, tiuj kiuj vizitas preĝejon, kaj vivas alimaniere, sed ankaŭ tiuj, kiuj la instruojn de la eklezio kaj de la Sankta Skribo simple ne obeas. Sur la manon de sinjoro paroĥestro eksidis abelo. La abelo kontente zumas. Kvazaŭ ĝi sentas: neniun timon, ĉi tie mi estas en bonaj manoj, ĉi tie nenio okazos al mi.

- Sed, knabo, kial vi havas zorgojn? Dio estas Dio kaj Li scias, kio devas kaj ne devas esti. Li sian vorkon prizorgos. Kiomfoje jam ŝajnis, ke la ŝipo de Petro subakviĝos, kaj vidu, vi iras pluen. La paroĥestro estas trankvila, ridetas, lia trankvilo malarmigas. Kiu kuraĝus kulpigi lin, ke li ne plenumas siajn devojn dece? Ke tio ne progresas, kiel ni deziras? Estas necese fidi Dion kaj preĝi al Dio, fari pli ni ne povas. Mi mense pritraktas la galerion de personoj de la ĉi-tieaj kredantoj, paroĥestroj, kiujn mi konas, teologoj, kun kiuj mi studis kaj kun kiuj mi vivas. Mi ne povas diri, ke ili ne plenumas siajn devojn. Centmiloj da pastroj, milionoj da kredantoj en la tuta mondo plenumas siajn devojn dece, nenion oni povas riproĉi al ili, sed tamen la stato estas tia, ke oni ne povas esti kontenta. (...)

Nun estas vespero. La vespero antaŭ forveturo. Mi devas ankoraŭ veni al Hradec, viziti la seminariestron, informi pri nia vivo, akcepti konsilojn. Jes, noblajn konsilojn, sed kiuj en la vivo en Regno aspektas senespere. La horloĝo tiktakas. Mi rigardas la vizaĝon de mia onklino Helena. Ŝi estas laborlaca, zorgoplena. Onklo Jozefo ankoraŭ ion finfaras en la stalo. Mi vidas, ke la onklino preparas sin diri al mi laŭ ŝi ion gravan. Mi scias, kion ŝi diros: mi ne aŭdis, knabo, tre bonajn aferojn. Sinjoro paroĥestro ne estas kontenta pri ci. Sinjoro paroĥestro supozas, ke ci okupiĝas pri aferoj, pri kiuj disciplinema kaj bona paroĥestro ne okupiĝas. Sinjoro paroĥestro sentas gravajn timojn, ke ci ne iras laŭ la ĝusta vojo. Sinjoro paroĥestro timas, ke el ci kreskas spitema, orgojla herezulo. Ci multe pensas, knabo, multe pensas, tio venigos cin malproksimen. El ci estos denove ia Hus. Kompreneble Hus malgrandega, transigata el mizera paroĥo al paroĥo pli mizera, tien, kie ci tamen nenion povas difekti, ĉar la nombro de kredantoj estas tie kvin kaj duono. Mi rigardas la vizaĝon de la onklino. Ŝi proksimiĝas al la kvindeka jaro. Kaj kvindek jaroj en kamparo estas jam granda aĝo. Tiam oni jam devas pensi pri la futuro. La vilaĝa laborego ne estas facila. Neniam ĝi estis, sed en tiu ĉi milito ĝi estas duoble malfacila. Onklino, afabla kaj kara, laborlaca, mi scias, kion vi volas diri al mi, antaŭ kio vi

volas averti min, kion vi petas de mi. Vi petas de mi iom da sia trankvilo, iom da mia dankemo. Mi ja scias, kiel vi ĉion jam pripensis. Vi sidos en la unua benko, vi ornamos la preĝejon, vi estos kuiristino por mi, por ke ne estiĝu iuj kalumnioj. La onklo laboros en la ĝardeno, ion li riparos. Jes, kaj ci ĉeestos baptojn, sepultojn, nuptojn, ci irados sanktolei mortantojn. Ci estos bona, milda, kara homo, kiu scias, kio konvenas kaj decas al aŭtoritatoj, ĉar nur kiam ci estos tia, ci estos afabla kaj bona proĥestro. En la okuloj de la onklino ekbrilis larmoj. Knabo, kion ci faras, mia revo foriĝas, mia certeco de trankvila maljuneco disfalas. Kion ci faras, knabo, en kion ci ĵetas cin?

Kaj kiam mi vidas min en la agresema mondo kun tiom da nacioj, lingvoj kaj tiom da religioj kaj kredoj, kaj ĉi tie la golfon de hejma trankvilo, sed ankaŭ de etanimeco, kiu ne supozas kaj nenion scias pri rabaj fluoj, kiuj tiun ĉi mondon obsedos, vane mi pensas, kion diri. Kaj tiam mi havas ideon, nur tiel, kvazaŭ diablon tenti, kaj mi diros: Onklino, mi scias, kion vi volas diri, ne timu, neniu herezulo mi estos, sed se mi estos pastro, tiam mi volas esti misiisto. Mi vidis la mondon, mi ekkonis ties vizaĝon, mi eble eĉ ne taŭgos por nia hejma situacio, jes, ĉi tie mi havus problemojn kaj malfacilaĵojn, renkontus barojn, sed ekzistas ankaŭ aliaj eblecoj, kion vi opinias, se mi estus misiisto? Tiun ideon mi ekhavis entute tiumomente, neniam mi pensis pri tio, ĝi simple elglitis el mia buŝo, jes, ni rigardu, kion ĝi faros, kion ŝi diros pri tio al mi.

- Sed knabo, kia sensencaĵo estas tio? Ie moviĝi tra la mondo, esti sen hejmo, inter iuj sovaĝuloj, sen trankvilo, kian vivon ci havus? Iutempe mi legis en misiista gazeto, sed tio estas neniu mielfarto, tio estas danĝero. Tion ci, knabo, ne povas fari al mi. Ĉi tie ni sentas timtremojn pro cia vivo, ni sendas pakaĵojn al ci, por ke ci vivu, kaj ci nun elpensas tian sensencaĵon? Knabo, mi ne antaŭsciis, ke ci estas tiom malproksima de ni, ke ci eĉ volas foriri. La tuta seniluziigo speguliĝas en ŝia vizaĝo. (...)

Ne timu, onklino, mi ne estos misiisto. Ne timu, mi estos prudenta. Mi karesas ŝian vangon kaj diras: Ne timu, onklino, ĝi estis nur ideo, nur tiel ĝi elglitis el la buŝo, mi tute ne pripensis tion, mi scias, estas freneze, sciu, ke mi veturos nenien en la mondon, mi ja per mia tuta korpo ĝojatendas tion, kiam mi revenos. Mi scias, kio estas fremdlando, mi scias tion pli bone ol vi. La onklino pripensas tion, ĉu estus eble resti hejme, ŝi elpensas diversajn iluziajn planojn. Tio pruvas ŝian nekonon de la mondo kaj de cirkonstancoj. Ne, ke mi mem ne pensus same, sed bedaŭrinde resti hejme mi ne povas, mi troviĝas en la registro de armil-entrepreno, se mi ne venus, mi devus kaŝi min, sed kie? Mi ne rajtas fari malfacilaĵojn, ni mem havas da ili sufiĉe. Tiaj estas niaj vesperoj.

(Tradukis Jiří Patera)

## **Inĝ. Ĉestmír Vidman,**

honora membro de ĈEA kaj membro de Socio de ĉeĥaj verkistoj, mortis 92-jara la 18-an de oktobro 2013. Li verkis precipe en la ĉeĥa lingvo, sed iujn poemojn li verkis ankaŭ esperantlingve kaj kelkajn esperantajn li ĉeĥigis. Kelkajn liajn poemojn esperantigis Jaroslav Mráz, sed volumojn de liaj poeziaĵoj esperantigis Jaroslav Krolupper. Ĉestmír Vidman verkis ankaŭ teatraĵojn por Eva Seemannová, kiu prezentis ilin surpodie en sia propra esperantigo. Liajn literaturajn verkojn redaktis Margit Turková.



## **Písně kosmické po 125 letech**

Ĉestmír Vidman (2003)

\*\*\*

*Kam odlétají a kam mizí  
všechny ty tóny čisté ryzí  
z hudebních představení  
které dirigenti vedou přísně  
k plnému rozeznění  
Teprve u dálných hvězd jsou zastaveny  
a vesmírem jsou ozářeny  
vracejí se  
v mezihvězdném čase  
mezi pozemšťany  
jako dar opisovaný  
stále krasopisně  
a pak přednesený  
na hudebních představeních  
co kosmické písně*

## **Kosmaj kantoj post 125 jaroj**

(Tradukis Jaroslav Krolupper)

\*\*\*

*Kien malaperas kaj kien navigas  
ĉiuj puraj tonoj kiuj nin ĝojigas  
kaj kiujn ĉe koncertoj  
direktas la ekspertoj  
ĝis plenplena sono  
Haltigis ilin nur reven-ordono  
de lontanaj steloj  
kaj ili revenas kun lum-dono  
en interstela tempo  
inter la teranojn  
en la kosma fono  
kiel la konstanto  
kiun poste violono  
ludas en salono  
kiel kosman kanton*



## **Slunce**

*Paprsky provrtávají krajinu  
ostrým laserem*

### **SLUNCE**

*robot oblohy  
věčně na nohou*

*Vypraví děti do školy  
dělníky do dílen  
mámy na nákup*

*A ještě mu stačí čas  
na jarní barvy  
pro sadaře*

## **Relativita**

*Je kosmos  
Jsou miliardy galaxií  
Jsou obrovité hvězdy  
Je sálající naše Slunce  
Je Zeměkoule  
Je člověk  
Je mravenec  
Je mravenčí vajíčko ve vesmíru  
A všechno to obíhá  
všechno se točí  
jeden vedle druhého  
každý závislý na jiném  
A všechno má svůj řád  
I člověk I mravenec  
A je mikrokosmos v kapičce vody*

## **La Suno**

*Radioj traboras la pejzaĝon  
per la akra lasero*

### **LA SUNO**

*la roboto de la firmamento  
eterne viglanta*

*Ekspedas infanojn en lernejon  
laboristojn en laborejojn  
patrinojn por aĉetado*

*Al ĝi ankoraŭ sufiĉas la tempo  
por la printempaj koloroj  
por fruktokulturistoj*

## **Relativeco**

*Estas la kosmo  
Estas miliardoj da galaksioj  
Estas grandegaj steloj  
Estas varmoradiana nia Suno  
Estas la Terglobo  
Estas la homo  
Estas la formiko  
Estas la formika ovo en la kosmo  
Kaj tio ĉio giras  
ĉio turniĝas  
unu apud la alia  
ĉiu dependanta de la alia  
Kaj ĉio havas sian ordon  
Kaj la homo Kaj la formiko  
Estas ja mikrokosmo en la guteto de  
akvo*

## **Jaro**

*Konvalinky stojí jako vojáci  
s ruksakem květů  
A kaštany mají  
v padácích pupenů  
naskládáno hedvábi dále*

*Protony si nemohou  
obíhat jinak  
než jak přikazuje  
vesmír v kapce vody  
Kubický milimetr slunce  
bys neunesl*

## **Východ Země**

*Už nejen jásavý východ Slunce  
Tajuplné vycházení Luny  
Najednou před námi  
barevný východ Země  
planety neznámé  
na jasném nebi*

*Z pradávných hloubek  
vesmírných nocí  
průhled kosmickým prachem  
na modravý kotouč  
tajemné  
rodné Země*

## **Printempo**

*Majfloroj staras kiel la soldatoj  
kun floro-dorsosako  
Kaj kaŝtanoj havas  
la paraŝutojn de burĝonoj  
ŝargitajn per la silko de lontanoj*

*Protonoj ne povas  
giri alimaniere  
ol kiel ordonas  
la kosmo en la guto de la akvo  
Kuban milimentron de la suno  
vi ne elportus*

## **Leviĝo de la Tero**

*Ne nur brila leviĝo de la Suno  
Mistera leviĝo de la Luno  
Subite antaŭ ni  
kolora leviĝo de la Tero  
planedo nekonata  
sur la serena firmamento*

*El pratempaj profundoj  
de kosmaj noktoj  
rigardo tra kosma polvo  
sur la bluetan diskon  
de la mistera  
naska Tero*

## ***Smíření***

*Dnes ráno  
sotva jsem vyšel z domu  
přivál mi vítr k nohám  
zkrabacený list  
I ptačí křídla  
ať vzlétnou sebevýš  
pokorně se zase vracejí  
k zemi  
Ovoce sklizeno  
Pole osiřela  
babička vypráví vnoučatům  
co bylo a co bude  
Ať ti mladí vzlétnou  
dál než my  
A pak se pokorně vrátí  
k rodné zeměkouli  
Vše končí  
A přece  
Všechno zase znova  
nově začíná*

*P. S.*

*Z těch tisíců let  
tlení v hřbitovech  
vylétá vždy znova  
jásavý trylek  
kosmických písní*

## ***Repaciĝo***

*Hodiaŭ matene  
ĵus kiam mi eliris el la domo  
vento alblovis al miaj piedoj  
ĉifitan folion  
Eĉ se birdaj flugiloj  
ekflugus kiom ajn supren  
ili ree humile revenas  
al tero  
Frukto rekoltita  
Kampoj orfiĝis  
avino rakontas al genepoj  
kio estis kaj kio estos  
Ekflugu la gejunuloj  
pli foren ol ni  
Kaj poste ili humile revenu  
al la naska terglobo  
Ĉio finiĝas  
Tamen  
Ĉio ree denove  
aŭtente komenciĝas*

*P. S.*

*El la miloj da jaroj  
de polviĝo en tombejoj  
elflugas ĉiam ree  
jubila trilo  
de kosmaj kantoj*



**ČESTMÍR VIDMAN  
(1921-2013)**

## El la poemoj de Eli Urbanová

### *Peza vino*

*Ja estis peza vino,  
kiun ni trinkis kune.  
Flamruĝa laŭ koloro,  
laŭ gust' tre dolĉa, ĉu ne?  
Ni tostis... Du pokaloj  
ektintis pro la ĝojo...  
Trinkite - ĝis la fundo.  
Aĥ, je kioma fojo?*

*Kaj pasas tag' post tago  
en vico senvaria  
kaj jen anstataŭ sobri  
mi estas plu ebria...  
Ne volas trankviliĝi  
la pulseganta sango.  
Mi pezan vinon sentas  
ankoraŭ sur la lango...*

### *Frigida edzino*

*Nenio lia ŝin ekscitas:  
nek la okul' trankvile blua,  
nek buŝo, ĉiam predikpreta.  
Kondut' entute tro kvieta  
ŝin laca lasas kaj enua.  
Jen kion diri ŝi hezitas.*

*Malvarma kiel mem marmoro  
glitadas ŝi el vestkiraso...  
Nur kiam ŝi sur lito kuŝas  
kaj suverene li ektuŝas  
dum ama akto sen ekstazo,  
en ŝi eksplodas muta ploro.*

### *Songô*

*En la brua rond', kvankam tre adora,  
sola estis mi, senespere sola.  
Fakte havis mi nuran intereson  
trovi forgeson.*

*Funde en anim' doloriga dorno.  
Aĥ, likvidi ĝin dum balzama dormo!  
Longe regas min unu pet', ne plio:  
Venu, Julio!*

*Lumo en la pord'... Diafane pura  
paŝas al mi vir' en la tog' purpura.  
Li, Julio mem! Mia patro, frato,  
mia amato!*

*Kion portas li? Ĉu ne oran liron?  
Eksonoris kord'... Mi retenas spiron...  
Kaj jam tra l'aer' melodio mola  
ondas konsola...*

*Dioj, kia bel'! Kiel rara sento  
vibras el muzik' de ĉi instrumento!  
Ludu, ludu do! Al olimpa alto  
levas al arto.*

*Pasis melodi', kun la dorm' ĝi pasis.  
Aŭ mi songas plu, aŭ mirakl' okazis!  
Jen sur sofa ruĝ' - je plej granda miro -  
oras la liro.*

## Výstava Bonaj lokoj



V galerii Prádelna Bohnice se od 3. 10. do 10. 11. 2013 konala výstava s esperantským názvem „Bonaj lokoj“.

Níže uvádíme popis výstavy, jak je uveden na internetových stránkách uvedené galerie:

*Kurátorky: Katarína Slaninová, Vanda Sepová*

*Prezentovaní umělci: Tereza Bušková / UK , CZ /, András Cséfalvay / SK/, Jonáš Gruska / SK /, Csilla Nagy /SK/, Ailbhe Ní Bhriain /IRL/, Laura Pawela / PL / Ivan Svoboda / CZ /*

...

*Podle mnohých teorií je eskapizmus mentálním vybočením, únikem z nepříjemné nebo banální reality každodenního života. V extrémním případě zahrnuje aktivity pomáhající tlumit přetrvávající pocity smutku a deprese. Zatímco většina odborníků přisuzuje tomuto fenoménu negativní konotace, existují i ti, kteří eskapizmus vnímají jako pozitivum otevírající obzory a umožňující lidstvu prostřednictvím snění, “zažívání” jiné reality posouvat samotné hranice lidského pokroku. Filozof Ernst Bloch byl jedním z těch, kteří vnímali procesy eskapizmu jako “princip naděje” a tvrdil, že “budoucnost je vytvářena v kreativním každodenním snění lidí.”*

*Umělci i samotné umění jsou často považováni za formu eskapizmu par excellence. V povědomí mnohých přetrvává stereotypní vnímání umělce jako nešťastného, neseřízného, depresivního jedince bezedně se oddávajícího nikam nevedoucímu blouznění.*

*V posledních dekádách, pod vlivem nepříznivé ekonomické a s ní související sociální situace, začíná vzkvétat množství činností odvádějících lidi od nepříjemné reality. Eskapizmus se pomalu stává jakýmsi nepsaným, latentně pod povrchem bublajícím manifestem duchovní atmosféry dnešní společnosti. Není to však jen jeho negativní tvář, jsou zde i činnosti, aktivity posouvající stav společnosti jako katalyzátor progresu dál. A právě umění může být tímto nástrojem.*

*Výstava BONAJ LOKOJ je pilotním eventem rozsáhlejšího projektu zabývajícího se problematikou eskapizmu a jeho vlivu, resp. signifikantnosti pro život dnešní společnosti v širším měřítku několika disciplín.*

*Výstava v Prádelně Bohnice se prostřednictvím děl vybraných umělců pokouší představit linii “eskapistického” umění v blochovském duchu teorie naděje generující jiné světy, otevírající brány lidské imaginace a fantazie, které v konečném důsledku mohou naši společnost posunout dál. Zároveň prezentuje různé přístupy umělců v nakládání s prvky snění, imaginace, nebo úniku do alternativních, mnohokrát virtuálních světů.*





**B U L T E N O**  
de Esperantista Klubo en Praha  
Věstník Klubu esperantistů v Praze  
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

**Klub esperantistů v Praze**

C/o Jiří Patera

U Ryšánky 1534/21

147 00 Praha 4